



An organ of the Esperanto Association of Britain

Organo de Esperanto-Asocio de Britio

No. 36, January–March 2007 ★ N-ro 36, januaro–marto 2007

ISSN 1741-4679

International communication without discrimination ★ Respect for all cultures
Internacia komunikado sen diskriminacio ★ Respekto por ĉiuj kulturoj

EAB team again at the London Language Show

The London Language Show took place again this year, from 3 to 5 November, at Olympia. For the third year running a team of volunteers from EAB organised and manned a stand.

I did duty with Helen Fantom on the Esperanto stand at the Language Show at Olympia on the first day. It was far more interesting than I'd expected.

The profile of visitors is different each day. On Friday morning, school children and teachers attended the prize-giving for a language competition. I spoke to a teacher who'd come down from Nuneaton to be with her student – a lad of eight who'd learnt four languages, the last being Swahili. 'Easy,' he said.

Teachers wear a yellow 'VIP' sticker, so they are the ones to

seek out if you want to promote the Springboard project and Language Awareness. One education advisor, who'd heard the presentation on Springboard last year, brought a colleague and explained it to her with great enthusiasm – I just had to hand her the clipboard to sign for a teacher's information pack.

Many teachers I spoke to were from private schools where a second language (or more) is successfully taught at primary level. No teacher said that a foreign language was difficult for their young students.

Helen targeted the younger children, and I tried to interest teenagers and older students. Quite a lot of postgraduates and young people who had just finished A-levels were at the exhibition, some to seek job opportunities.

A bright animal poster, with pictures drawn by Viv O'Dunne, turned out to be quite an attention-grabber. Above each animal is the Esperanto name, and below the picture is the translation in several different tongues – showing the language connections. Some were purchased

Photo: John Wells

Part of the team pause on Sunday afternoon in front of EAB's stand.

From the left: Helen Fantom, Tim Owen, Martin Minich (a visitor from Slovenia, who had just finished working for a year as the TEJO volunteer at UEA headquarters in Rotterdam) and Gavan Fantom. Around 500 people got information packs on Esperanto during the weekend.



by private primary schools where they don't want Springboard, but where the poster fits in with their teaching.

The Esperanto stand was near the study area for 'taster' courses, each of which lasts about 30 minutes. It meant people were coming and going all day. A young woman was disappointed that we weren't offering a taster course in Esperanto. This reflects the general attitude of the type of people who come to the language show – open, intelligent, posi-

tive. I was delighted how many people said 'yes', they knew about Esperanto, considering that we've been told that 'no one has heard of it'. One postgraduate said she'd done some Esperanto research as part of her studies.

I believe it fills the remit of 'Educating the public in the international language, Esperanto' – EAB's chief aim. At present we haven't an alternative method of reaching such an intelligent audience.

Joyce Bunting

Another view of the stand on the Sunday. Angela Tellier and Elizabeth Stanley presented the Springboard project once each. Daniel White also helped to enrol passers-by with remarkable energy and enthusiasm. Addresses of interested people were collected for sending further information. UEA President Renato Corsetti was also in London and came along to see the stand. An enthusiastic member of our team approached him on the merits of the international language!

Photo: John Wells



REDAKTORA NOTO

Fronte al nova jaro

Certe ankoraŭ en ĉiuj niaj pensoj estas la bedaŭrinda forpaso de William Auld. Lia kontribuo al la kulturo de Esperanto estas apenaŭ kalkulebla, kiel EAB-Ĝisdate provis kroniki en sia pasintjara januara numero. La plej granda honoro, kiun ni povas fari al li, estas relegi liajn ĉirkaŭ 80 librojn.

La vivo kaj la agado daŭras. Ni aparte danku ĉiujn, kiuj ankoraŭfoje kunlaboris por organizi kaj efektiviĝi la Esperanto-standon ĉe la Londona Lingva Ekspozicio.

Kaj venas nova jaro, do jam tempo por realiĝi al UEA (vidu paĝon 10). Ne forgesu, ke miloj da esperantistoj en malriĉaj landoj sopiregas aliĝi al nia internacia asocio, do ni ŝuldas al ili nian subtenon. Kial ne, se vi povas, iom krompagi al Fondajo Canuto, kiu pagas membro-kotizojn por ĉi tiaj personoj?

Feliĉajn festotagojn kaj prosperan – kaj precipe varbo-sukcesan – novan jaron!

Geoffrey Sutton

- Material for the next issue of *EAB Update* should be with the editor no later than 1 March.
- Materialo por la venonta numero de EAB-Ĝisdate atingu la redaktoron plej laste la 1-an de marto.

EAB-Update / Ĝisdate is a quarterly organ of the **Esperanto Association of Britain** / estas kvaronjara organo de **Esperanto-Asocio de Britio**, **Esperanto House / Esperanto-Domo**, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE.

Tel. 0845 230 1887 or +44 (0)1782 372141

Fax / fakse: on request / laŭpete

E-mail / rete: eab@esperanto-gb.org

Websites / ttt-paĝaroj: www.esperanto-gb.org
www.esperantoeducation.com

□ **Membership** of EAB costs £25 a year (£20 concession); supporter or youth member £10 / Membrigi en EAB kostas £25 pundojn jare (£20 rabatite); subtenanto aŭ juna membro pagas £10 pundojn.

☆

□ **Material for Update** should be sent by e-mail, computer disk or hard copy direct to the editor / **Materialon por Ĝisdate** oni sendu rete, diske aŭ papere rekte al la redaktoro: Geoffrey Sutton, 7 Clover Road, Aylsham, Norwich NR11 6JW; e-mail / rete: gsutton@macunlimited.net. Material may be in Esperanto, English, Welsh or Gaelic / Materialo rajtas esti en la lingvoj internacia, angla, kimra aŭ gaela.

□ EAB also publishes the review *La Brita Esperantisto*, wholly in Esperanto / EAB eldonas ankaŭ la revuon *La Brita Esperantisto*, tute en Esperanto.

☆

□ EAB is a registered charity (No. 272676) and an affiliated national association of the **Universal Esperanto Association**, which has official relations with the United Nations and Unesco / EAB estas lege registrita bonfara asocio kaj aliĝinta landa asocio de **Universala Esperanto-Asocio** (*Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 Rotterdam, Nederlando*). Tel. 00 31 10 436 1044; fax / fakse: 00 31 436 1751; e-mail / rete: uea@uea.org; www.uea.org, kiu havas oficialajn rilatojn kun Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko.

☆

□ EAB is also affiliated to the International League of Esperanto Teachers and the European Esperanto Union / EAB aliĝis ankaŭ al Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kaj Eŭropa Esperanto-Unio (EEU).

☆

□ The views expressed in *EAB Update* are not necessarily those of the Management Committee of EAB / La opinioj esprimataj en *EAB-Ĝisdate* ne nepre estas tiuj de la Administra Komitato de EAB.

Points from the October Meeting

The last meeting of EAB's Management Committee took place on 7 October at the Central YMCA in London. Present were John Wells (president), David Bisset, Jean Bisset, Joyce Bunting, Edmund Grimley Evans, David Kelso and Derek Tatton. Apologies were received from Helen Fantom, Eric Walker and Andrew Wheatley.

The meeting opened with a short silence in memory of Bill Auld, who had died recently. John reported briefly on the funeral, where he had represented EAB.

Administration

A table of 'achievements in the previous year', as recommended by Charity Commission, was submitted by Joyce and approved by the committee.

It was agreed that there should be a coffee-break during the election process at the Annual General Meeting, to allow adequate time for vote-counting. We should seek suitable volunteer scrutineers before the start of the meeting.

The advertisement on the back page of the next issue of the *Jarlibro de UEA* had been booked.

Edmund reported that we have changed webserver. David Kelso has since written to Bill Walker thanking him for his excellent work on the website.

Amendments to the Information Pack had been issued with *EAB Update*, as agreed.

Finance

Joyce spoke to her report, circulated previously. A budget for 2006–07 had been drafted and circulated.

Following the agreement in principle at the previous meeting, Joyce proposed the following 'designations' over five financial years: Buchanan Lectureship £2,500; Butler Library £30,000; Publicity & related matters £42,500; the balance (approx. £175,000) for Education. This was agreed.

The committee agreed to pursue incorporation of the

trustees through the Charity Commission. It was also agreed to open a separate bank account for education projects such as Springboard.

The remarkable success of the on-line payment system (World Pay) was noted. Viv O'Dunne and Vilĉjo Walker were to be congratulated for their work.

Office and Esperanto House

Joyce reported on the mailshot organised in support of the South-East Federation.

The matter of additional storage space in Esperanto House was raised. It was agreed that the possibility of an extension to Esperanto House be actively pursued. Joyce is to take this forward with a local architect and the planning authorities and come back in due course with a concrete proposal, if feasible, including reference to alternative options.

It was proposed that the plaque commemorating Albert Goodheir, which has unfortunately been damaged apparently by tree resin, be repaired at a cost of approx. £200. It was also agreed that EAB offer to put a plaque on the Neergaard sculpture, at a cost of approx. £140.

David Kelso is to review and update the Volunteer Network.

Repainting of Esperanto House would take place during this autumn.

Education

David Kelso spoke to Angela's report, previously circulated. The committee commended Angela on an impressive range of activity.

It was noted that the Springboard pilot in the Cambridge school is proceeding smoothly.

David Kelso reported on the saga of Springboard Evaluation. The situation had, however, improved considerably. Esperanto Studies Foundation's offer of financial support of up to \$10,000 remains on the table.

It was agreed that EAB commission an independent literature review on the subject of Language Awareness, at a cost of approx. £1,000.

Angela had raised the issue of providing books for school libraries. After discussion, it was agreed that we spend up to £100 per school, within an annual budget of £500, for this purpose.

Surplus *Urso-Kurso* books may be sent to a possible partner school in Benin.

Publicity and media

A draft publicity postcard had been submitted, which might be distributed at exhibitions, by groups and individual members. It was agreed that the idea was a good one. David Kelso is to take the matter forward.

Paul Gubbins has been retained on a media consultancy basis. His first month of office coincided with the media interest in Bill Auld's death. It was agreed to congratulate Paul on the excellent obituaries that appeared in several national newspapers, i.e. *The Scotsman* and *The Daily Telegraph* (22 Sept.).

Liaison

Derek Tatton spoke to his report, circulated previously. It was agreed that Andrew Wheatley take over responsibility for Language Watch, with assistance from Derek.

Andrew would also be invited to put a proposal to the next meeting for activity to strengthen federations and groups.

Buchanan Lectureship

It was agreed that it would be interesting if Angela did a brief

presentation before the 2007 Buchanan Lecture (during the Letchworth Congress), outlining the origins of the Buchanan Bequest.

It was also agreed to establish a Buchanan Committee, consisting of Derek, Paul Gubbins, David Kelso and Angela, with John Wells as adviser, to take forward the range of activities arising from the agreement with Liverpool University. A draft agreement will be circulated to fellow trustees.

It was agreed to draft new rules for the Buchanan Prize, which will also have to be agreed with the university. Derek is to take this forward.

Congresses

Terry Page joined the meeting for this item and spoke to his report, circulated previously.

The Local Congress Committee have agreed that Renato Corsetti, as Buchanan Lecturer, would in effect be the guest speaker for the 2007 British Congress in Letchworth. The Letchworth committee have a fixed break-even number of enrolments at 55. Enrolments to date have been slow, but Terry was hopeful that the Local Congress Committee's target figure could be achieved before the deadline set by the venue owners.

It was agreed that the Management Committee would be available for a question-and-answer session, if invited.

It is being explored whether the 2008 British congress might take place in the North-West.

Butler Library

David Bisset confirmed that additional storage space, as proposed earlier, would be invaluable for the library and warmly supported the decision to explore possibilities with a local architect.

The question whether the local Barlaston village library would move to the college

campus remains uncertain; this has implications for the existing storage arrangements, as well as for possible building developments.

David confirmed that the book listing of the library, which Mike Seaton has been working on for several years, should be complete during 2007. □

LETERO DE LA PREZIDANTO DE UEA

Atenti la Semajnon de Homaj Rajtoj kaj Esperanton

Bedaŭrinde la letero venis tro malfrue por la pasinta numero de ĉi tiu bulteno, sed ni ĉiuj eble provu pli precize atenti la aferon en la venonta jaro. La homaj rajtoj estas unu plej esenca ero en nia argumentado.

Homaj Rajtoj riskas iĝi tro banala esprimo, ĉar ĝi estas redirata tagon post tago, horon post horo de ĉiuj inform-kanaloj de la mondo. Ĝenerale oni parolas pri la homaj rajtoj, kiujn ni respektas kaj niaj malamikoj ne respektas. Neniam oni parolas pri la homaj rajtoj, kiujn ni ne respektas kaj niaj malamikoj respektas. Lastatempe iĝis laŭmoda la utiligo de homaj rajtoj eĉ por celoj komercaj: tiu difinita lando ne rajtu vendi siajn pli malmultekostajn varojn ĉe ni, ĉar ĝi ne respektas la homajn rajtojn, dum ni nur sekvas la merkaton, kiu sen nia kulpo, igas nin havi homojn sen la rajtoj, kiujn oni insistis enmeti en la duan parton de la deklaro.

Bonŝance rigardado de la statistikoj de Unuiĝintaj Nacioj pri la landoj, kiuj subskribis kaj ratifis la internaciajn interkonsentojn ĝuste pri protektado de rajtoj de homoj, de infanoj, de indiĝenoj, de virinoj ktp. povas instrui en ĉi tiu kampo pli ol miloj da horoj da televidaj novaĵoj.

Ĉiukaze estas unu aspekto de homaj rajtoj, pri kiu oni apenaŭ parolas. Temas pri la lingvaj homaj rajtoj. Jes, kelkaj izoluloj, neesperantistaj kiel ankaŭ esperantistaj, parolas pri tio. Ili asertas, ke tio, kio estas skribita en la artikolo 2-a de la deklaro

efektive devas validi, ankaŭ rilate lingvon.

Fakte en la retejo de la Supera Komisiito de UN pri Homaj Rajtoj. <http://www.unhchr.ch/udhr/lang/1115.htm>, oni povas legi ankaŭ en Esperanto, ke:

Ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en tiu ĉi Deklaracio validas same por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferencigo, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato.

Kaj tamen, ni, kiel esperantistoj ekestis ĝuste, por ke tiuj rajtoj estu respektataj ĉie, kaj, bonvolu atenti, je ĉiuj niveloj. Oni ne rajtas defendi la lingvon de la enmigrinta grupo, kaj ne samtempe tiun de la tradicia malplimulta nacio vivanta en la lando de longa tempo. Oni ne rajtas defendi la lingvajn rajtojn de la malplimulta nacio kaj ne samtempe defendi la lingvajn rajtojn de la tuta lando antaŭ pli fortaj internaciaj lingvoj. Mi volas diri, ke oni ne rajtas batali nur por protekti la oficialajn lingvojn de Eŭropa Unio kontraŭ la evidenta klopodo de la angla forviŝi ilin kaj ne samtempe batali por la lingvaj rajtoj de la bretonoj en Francujo kaj de la turkoj en Eŭropo.

Nur esperantistoj povas kompreni la miopecon de multaj

Internacia Amikeca Renkontiĝo – Aylesford invitas vin por la venonta jaro

La Priorejo de la Karmelanoj **Len Aylesford**, Kent, estas bela kaj interesa, ne nur por rom-katolikoj sed historie. Ĝi estas kaj priorejo, celo por pilgrimoj, kaj moderna konferencejo. Do ni 'Esperanto-pilgrimoj' ĝuis de la 22-a ĝis la 25-a de oktobro bonajn manĝojn en mezepoka monaĥeja manĝoĉambro, el kiu oni povus pasi rekte en la riveron Medway, se oni malobejus la ordonon 'Ne malfermu ĉi tiun pordon!' Ni kunvenis en komforta

ĉambro kaj dormis en litĉambroj, kie videblis malnovaj traboj.

Plene okupis nin la programo, planita kaj prezentita de Sally Phillips. Roy Simmons ludigis nin per sia propra, kaj nun konata kaj ŝatata ludo 'Skramblo', kiu ekzercas ne nur la cerbon sed ankaŭ la genuojn, ĉar oni organizas vortojn sur la planko. Terry Page prezentis lingvajn ludojn kaj lingvajn defiojn, taŭge nomitajn, kaj regis en la ĉambro nekutima silento! Kimie

Markarian montris la sorobanon, japanan abakon, kaj klarigis kiel ĝi efikas por ĉiu komerca bezono dum centoj da jaroj kaj nun helpas komprenigi la signifon de ciferoj al generacio, kiu al kutimiĝas al elektronikaj kalkuliloj. Ĉiuj kontribuis pri la proponitaj temoj – gepatroj, vizitoj, aventuroj – io ajn! London, Ana Montesinos stimulis nian sciemon per komenca kvizo kiu, post niaj streboj, klare montris al ni, ke ni sciis ege malmulton pri Lihtenŝtejno. La prelego, tre klare prezentita, provizis la respondojn kaj poste, kun granda intereso, ni trafolumis la abundajn librojn, broŝurojn, mapojn, bildojn, kiujn ŝi pene portis al Aylesford.

La internaciecon provizis ses gajaj francinoj – vizitantoj, sed plejparte jam konataj kaj tre bonvenaj. Tiuj vigle kontribuis al la programoj, kaj el la temo 'gepatroj' leviĝis rakontoj, malgajaj, timigaj, amuzaj, de la dummilita germana okupacio. Verkajojn de Raymond Schwartz prezentis tre klare lia filino, Francine.

La suno brilis plejparte, kaj la unua ekzerco, serĉado por enigme priskribitajn kreskaĵojn, bestetojn ktp. devigis nin esplori la ĝardenojn, la lageton kaj sub la arboj – kaj tiel konatiĝi kun la ĉirkaŭaĵoj. Bedaŭrinde mankis poste sufiĉa libera tempo por plia esploro, kaj nur per maltrafo de bona prelego niaj gastoj povis vidi la malgrandan, belan kaj interesan urbeton de Aylesford, ĝiajn du pontojn, historian kaj modernan, kaj la 'plej mal-

grupoj, kiuj opinias, ke ili povos savi sin ankaŭ se la aliaj pereos. Ni naskiĝis por defendi la lingvaj homajn rajtojn je ĉiuj niveloj. Kaj tamen tiu miopeco ekzistas. Zamenhof tre brile diris, ke: 'tiu naciismo de grandaj nacioj estas maljusta. Tiu de malgrandaj nacioj estas, ankaŭ malprudenta'. Tiu estis la sama Zamenhof, kiu ankaŭ diris: 'Ni montros al la mondo, ke reciproka kompreniĝado inter personoj de malsamaj nacioj estas tute bone atingebla, ke por ĉi tio tute ne estas necese, ke unu popolo humiliĝu aŭ englutu alianaciaĵon'.

Surbaze de ĉi tiuj ideoj la estraro de UEA alvokas vin festi la Zamenhof-tagon en la kadro de la Semajno de Homaj Rajtoj kaj de Esperanto, de la **9-a ĝis la 16-a de decembro 2006**. Jam pasintjare ni diskutis pri tio, ke jam pluraj esperantistoj havis la ideon vastigi la signifon de tiu tago al 'Tago de Esperanto' kaj doni al ĝi ankaŭ informan elementon per aranĝado de eventoj kune kun aŭ por neesperantistoj.

Tiu semajno inkluzivas la 10-an de decembro, ĉiujara datreveno de la Deklaracio de Homaj Rajtoj, kaj la 15-an, kiu estas la Zamenhof-tago.

Do, la Semajno nun lanĉata ebligas agadon al la ekstero pri la

lingvaj homaj rajtoj. Ekzemple, kolektu informojn de nerespekto de lingvaj rajtoj en via loĝloko kaj sendu la pruvon pri tio al UEA, kiu siavice atentigos la Oficejon de la Supera Komisiito pri Homaj Rajtoj de UN. Estas tempo transiri de teoriumado inter ni al agado praktika pri la lingvaj homaj rajtoj. Vi povus aranĝi kunvenon pri tio kun neesperantistaj asocioj aŭ lingvistoj aŭ instruistoj ks. kaj klarigi al ili kial Esperanto estas parto de la tutmonda batalo por la homaj rajtoj.

Samtempe oni povas ankaŭ zorgi pri la tradicia pli interna agado (festo de la libro en Esperanto, kluba kunveno por memorigi pri Zamenhof).

Ni igu ĉi tiun semajnon ilo por atentigi la mondon pri lingvaj homaj rajtoj kaj pri la solvo de ili pere de Esperanto kaj samtempe por festi nian esperantistecon.

Renato Corsetti

It is still not too late to join!

***Festival weekend* 19–21 January 2007**

See further details in the previous issue of *EAB Update* (p.5).

• Contact: Wedgwood Memorial College, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DG. Tel. 01782 372105/373427; fax: 01782 372393; e-mail: wedgwood.college@staffordshire.gov.uk.

La afero Radio Pollando

Foje oni povas bedaŭri, ke ĉi tiun bultenon ni eldonas nur kvaronjare. Feliĉe, kiam venas frapa novaĵo, ni nuntempe disponas ankaŭ pri la interreto, kvankam multaj ankoraŭ ne havas aŭ ne volas havi ĝin. Kaj apenaŭ povus veni pli granda frapaĉo ol anonco, ke post preskaŭ 50 jaroj oni intencas ĉesigi la Esperantan dissendadon de Radio Pollando. Kompreneble, la vasta esperantistaro tuj ekagis. Ni ĉi-sube provas prilumeti la aferon per ricevitaj kontribuoj (iom redaktitaj). Ankoraŭ agu! Jen adresoj: Embassy of the Republic of Poland, 47 Portland Place, London W1B 1JH. Tel. 0870 774 2700; Fax 0207 291 35 75/6; e-mail: <polishembassy@polishembassy.org.uk>. Esperanto-redacio, Radio Polonia, rete: <pietrzak@wa.onet.pl>.

• Ian Mac Dowell wrote on 10 November that it is again possible to hear Radio Poland in Esperanto, but only on the internet (and only with broadband)!
‘Yes, from today it is possible to download the broadcasts from Radio Polonia in Esperanto again. The first you can download is that of yesterday 9 November, with reports on the President of Poland’s visit to England and Scotland – well worth listening to, as all these broadcasts are, but PLEASE, PLEASE send your report in to the head of the Esperanto section, Barbara Pietrzak at pietrzak@wa.onet.pl if only to say: ‘Mi ĝojis aŭskultivan elsendon ...’ plus your name, town and country of course!’

‘I’ve just spoken to Barbara on the phone, and she and her colleagues are most grateful for the worldwide support they are receiving and so richly deserve. She is still somewhat pessimistic about the future though, so keep those letters rolling in to them!’

grandan trinkejon’ en la graflando Kent. La iom pli proksiman preĝejon ili jam vizitis kaj eĉ feliĉe ĉeestis bapton. La venontan jaron bonvena estus iom pli da tempo por turismi, kaj tio certe okazos.

Post la fino de la programitaj eroj ni ĝuis iom da vino kun frandaĵoj kaj babilis. Ne mankis muziko dank’ al Terry Page, gitaro kaj bekfluto, kaj Peter

• Informu viajn esperantistajn geamikojn rapidi

Altestimataj kaj karaj geamikoj, konsternite mi ricevis la sciigon, ke kadre de planata reformo de la ĝenerala programstrukturo, la nova direktoro de la Pola Radio subtenas la ideon forigi la Esperanto-Redakcion.

Jam de la jaro 1959 ekzistas Esperanto-elsendoj de la Pola Radio kaj ĝis hodiaŭ la malmultnombra redakcio ricevas plej multe de la alvenantaj sendaĵoj de la aŭskultantoj. Nur tri jaroj restas ĝis la 50-jariĝo de la Esperanto-elsendoj el Pollando kaj la planata UK en la naskiĝlando de la lingvo Esperanto!

Prefere skribu al polaj kulturaj institucioj kaj la pola ambasado de via propra lando. Necesas tuja reago! Ni bezonas lavangon de savo kaj subteno kaj da leteroj! Diskonigu la malbonan novaĵon per viaj plej rapidaj rimedoj kaj skribu mem kaj petu viajn Esperantajn geamikojn reagi jam hodiaŭ!

Bolwell (akordiono).

La kunveno komenciĝas je vespermanĝo vendredon kaj finiĝas lundon post tagmanĝo, taŭga por transmarkolaj vizitantoj kaj por enlandaj, kiuj loĝas malproksime. Oftas trajnoj de Londono. Aylesford invitas vin por la venonta jaro. Bonvolu aliĝi frue por helpi al la organizantoj, Terry kaj Anica Page <terry-page@supanet.com>. □

Interreto donas la ŝancon al la tutmonda Esperanto-popolo doni respondon al la maltaŭga ideo de subpremo de la ĉirkaŭmonda deziro daŭre havi tian lingvan servon.

Kiu alia lando havus pli firman ligan al la Zamenhofa lingvo ol ĝuste Pollando? Tie naskiĝis la ideo pri neŭtrala internacia lingvo, kiu dum la paso de preskaŭ 120 jaroj alportis la fundamenton kaj konvinkon al la homaro, ke per neŭtrala lingvo estos grundo taŭga por amike interrilati.

Estus ne eltenebla perdo por la Esperanto-kulturo kaj almenaŭ nevenkebla retropaŝo en la disvastigo de nia ideo.

Ekagu!

Salutas, Reinhard Wagner

• Hitler and Stalin hated Esperanto

The introduction in Polish is here omitted from this letter addressed to the President of Poland, the chairman of Radio Polonia and others.

It is as a lifelong friend of Poland that I write to you. I am an Irish diplomat who served for five wonderful years at the Irish Embassy in Poland, but I am now writing to you as an Irish and an EU citizen, on my own behalf only. I most respectfully ask you to use your influence so that Polskie Radio will reconsider its decision to end broadcasting in Esperanto. Only Poland and China broadcast every day in this wonderful language, which was born in Poland in 1887. The closure of Polskie Radio/Redakcja Esperanta, after almost 50 years of broadcasting, could be used by enemies of Poland to attack your beautiful country for anti-semitism, as Dr Zamenhof, the initiator of Esperanto, was Jewish as well as Polish. Esperanto can be a valuable ally of all national languages, and thus of linguistic diversity, and can play a vital role in promoting linguistic justice.

Karaj gesamideanoj!

Meze de la jaro ŝanĝiĝis la aŭtoritatoj de la Pola Radio Akcia Kompanio. La laŭvican fojon ŝanĝiĝis la superuloj de ĝia Poreksterlanda Programo – Radio Polonia. Relative longe ni ne konis la novan programan vizion de la publika radio kaj de Radio Polonia, kies programo estas realigata interkonsente kun la pola Ministerio por la Eksterlandaj Aferoj. Hodiaŭ mi devas komuniki kaj informi, ke en tiu ĉi vizio forestas Esperanto Redakcio. Ĝian forigon premias la projekto de nova strukturo de Pola Radio, inkluzive de ĝia Poreksterlanda Programo – Radio Polonia. Cetere temas pri la unusola redakcio, kiu ĉesos ekzisti en Radio Polonia. La menciita projekto estis afiŝita sur la internaj retaj paĝoj de Pola Radio AK, marde posttagmeze, rekte antaŭ la komenciĝantaj festoj de Ĉiuj Sanktuloj kaj la Mortintoj. Laborantoj rajtas prezenti siajn rimarkojn al la prezidanto de la kompanio, K. Czabaski ĝis la 10-a de novembro.

La novaj radioaŭtoritatoj ekfunkciis fine de julio nunjare. Jam dum la unua renkonto kun la superulo de Radio Polonia ni eksciis pri neceso kontraŭbatali postkomunistajn influojn, regantajn en tiu programo dum 16 jaroj. Komence de oktobro la sama membro de la radiaj aŭtoritatoj signalis estontecan koncepton de nia programo. Laŭ ĝi al signifa plukonstruo subiĝos programoj en la ukraina kaj belorusa lingvoj, oni enpraktikigos instrukciadon de ĵurnalistoj el Ukrainujo kaj Belorusujo kaj por la ĵus-menciitaj landoj, oni intensigos pollingvan emisiadon al ĉi tiuj landoj.

Fakte la lingva oferto de Radio Polonia estas difinata fare de la pola Ministerio por la Eksterlandaj Aferoj. En la lasta kontrakto el la nunjara majo Esperanto en ĝi troviĝas. Sed nun la radia projekto ekskludas ĝin. La situacio estas drameca, ĉar la ŝanĝoj estas efektiviĝas en la lastaj tagoj fulmrapide. Oni ricevas la impreson, ke la nova administracio de la publika radio havas verdan lumon por ĉiuj siaj ideoj. Dum miaj provoj klarigi la signifon kaj atingopovon de niaj elsendoj, la viglajn reagojn el diversaj landoj de la mondo, interparolante kun miaj novaj superuloj mi ricevis lakonan respondon: 'Ni scias'. Mi estis ankaŭ informita, ke pri la estonteco de la Esperanto-Redakcio decidis Ministerio por la Eksterlandaj Aferoj. Ĉu tia decido estis efektive alprenita, mi ne scias.

Malgraŭ ĉio – ŝajnas al mi – ke ne eblas allasi, ke la eventuala malapero de Esperantlingvaj programoj de PR restu senĉa. Tial mi petas vian subtenon. Unuavice pere de nacilingvaj korespondadoj direktataj al polaj ambasadoj, polaj kulturinstitutoj en diversaj landoj kun la demando pri la estonteco de la Esperanto-Redakcio de Pola Radio. Kun elmonro de intereso por ĝia promocio rolo koncerne Pollandon, koncerne ĝian orientan politikon, kiu estas difinata kiel la orienta politiko de EU. Gravas – plurfoje esprimita – de niaj aŭskultantoj opinio, ke niaj elsendoj estas por ili unu el malmultaj aŭ eĉ unusola informfonto pri Pollando, ĝiaj atingadoj kaj progresoj, sed krome pri Belorusujo kaj Ukrainujo.

Ni bezonas ankaŭ similenhavajn leterojn adresitajn al la redakcio, por ke ili rolu kiel argumento en niaj rimarkoj, kiujn ni volas adresi al la prezidanto de PR ĝis la 10-a de novembro nunjare.

Ne sufiĉas protesti, ne sufiĉas esprimi sian indignon. Estas necesaj sobraj, trankvilotonaĵoj argumentoj.

Kvankam malfacilas tion konstati, ŝajnas, ke nia redakcio dividos la sorton de aliaj Esperanto-redakcioj, kiuj malaperis en la lastaj jaroj en diversaj radiostacioj. Tio estas tutcerte frapo por la promocio rolo de tiuj ĉi elsendoj pri Pollando kaj ĝiaj transformiĝoj. Ĝi estas frapo antaŭtage de la 150-a naskiĝdatreveno de la kreinto de la Internacia Lingvo, d-ro L.L. Zamenhof – aparte en la kunteksto de la plantata Jubilea Kongreso en 2009.

Barbara Pietrzak,
Esperanto-Redakcio de Pola Radio

Professor François Grin, an economist at Geneva University, published a report in 2005 which showed that the present dominant international position of the English language transfers at least 17 billion euros per year to the British economy, from countries such as Poland and 22 other EU member states, which speak their own national languages. It is clearly unjust that countries should suffer economically merely because their people speak their own languages.

Hitler and Stalin hated Esperanto, and had many people murdered just because they had learned Esperanto. This is well-documented in the historical study *Die Gefährliche Sprache* (The Dangerous Language), by Dr Ulrich Lins of the German Academic Exchange Service (Deutsche Akademische Austauschdienst), which has been translated into several languages. Further material about Esperanto, including material in Polish, is available on my personal website, www.seanoriain.eu. Pope Jan Pawel II publicly used Esperanto in *Urbi et Orbi* from Easter 1994 until his death. The present Pope, who dropped Esperanto at Christmas 2005, re-instated it at Easter 2006, due to worldwide reaction. The Esperanto programmes of Polskie Radio are extremely popular, and present a positive image of Poland throughout the world. The almost 50 years of broadcasting in a truly neutral international language every day is a unique achievement, and it would be a tragic mistake to end it.

I am confident, Mr President, that you will take steps to preserve this noble Polish tradition, which neither Hitler nor Stalin could kill, and that the Esperanto service of Polskie Radio will continue to serve Poland with distinction, as it has been doing for the past 47 years.

Seán O' Riain, Représentation permanente de l'Irlande auprès de l'Union Européenne. □

Herzberg: 'altnivelaj scioj' kaj la urbestro faras sian unuan paroladon en Esperanto

Ni volas resumi al vi la lastajn semajnojn, kiel ankaŭ pri la iom renovigita hejmpaĝo de Internacia Centro Herzberg (ICH) ĉe www.ic-herzberg.de, kie krom la freŝaj informoj nun en la menuo aperas nova punkto: Fotoalbumo, komence pri la ĉi-subaj renkontiĝoj.

Je la 3-a de oktobro finiĝis Torpedo 2, la tutlandaj pedagogiaj tagoj. Laŭ iniciato de Zsolt Korody denove okazis vere sukcesa semajnfino kun diversaj altnivelaj fakprelegoj. Estis bone ekhavi novajn sciojn por pli efika Esperanto-instruado, lerni novajn metodojn, didaktikajn elementojn, interŝanĝi spertojn. La ĉeftemo estis 'Lernolibroj kaj taŭgaj instrumentoj'. Ni jam rekomendas la sekvontjaran renkontiĝon kun la ĉeftemo 'Kiel uzi la plej novajn instruilojn en la Esperanto-instruado'.

Dum tiu fakseminario okazis ankaŭ pluklerigado de ekzamenaj komisaraj kaj estis ebleco trapasi ekzamenojn de Germana Esperanto-Instituto (GEI) kaj Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI). Dek kandidatoj partoprenis ekzamenojn de GEI, kaj naŭ personoj partoprenis

ekzamenojn de ILEI. Stefan MacGill emfazis, ke jam la duan fojon li spertis dum la ILEI-ekzamenoj en Herzberg la altnivelan scion de la kandidatoj pri Esperantaj kulturo, movado, literaturo, kio certe estas la rezulto de ilia partopreno en la tradiciaj studsesioj en Herzberg.

Vicurbestro Ulrich Schramke kaj prezidanto de Germana Esperanto-Asocio (GEA) Andreas Emmrich transdonis je la 30-a de septembro la atestilojn pri kursfinaj ekzamenoj. Ili multon lernis dum la du-semajna somera arbara Esperanto-lernejo kune kun la pola junulara grupo el la ĝemelurbo Góra. Aktivulinoj el Góra vizitis novajn Esperanto-rilatajn konstruaĵojn en Herzberg, ekzemple la Esperanto-arkivon en la subtegmentejo de la malnova urbodomo. Temis ankaŭ pri Esperanto-agadplano por la sekva jaro.

Je la 10-a de oktobro en la kavalira salono de Kastelo Herzberg okazis la inaŭguro de la nova jubilea GEA-ekspozicio. Ĝi pretiĝis por la 100-jara datreveno de GEA kaj estis ekspoziciata en Braunschweig dum la Germana Esperanto-Kongreso.

La urbestro de la nova 'Esperanto-urbo' Herzberg, Gerhard Walter, faris sian unuan paroladon en Esperanto.

Ĉu vi volas rigardi la vidbendon? Ĝi troviĝas en la retpaĝaro.

Korajn salutojn kaj bonvenon en nia / via Esperanto-urbo!

Interkultura Centro Herzberg

Herzberg serĉas volontul(in)ojn!

Esperanto-urbo Herzberg am Harz, Germanio, serĉas pliajn helpant(in)ojn (volontul(in)ojn) ekde aprilo 2007. Estas tre granda defio krei 'Esperanto-urbon'. Nemalmultaj interesaj kaj unikaj taskoj atendas vin!

Ekzistas granda biblioteko kaj arkivo. Krome ni havas nun du novajn ejojn ĉe la urbo (urba Esperanto-Arkivejo, kunvenĉambro). Ni havas pli ol 200 vidbendojn en Esperanto.

Unue ni pensas pri trimonata restado. Nepre regu Esperanton kaj regu la komputilon. Ni atendas memstaran laboron.

Ekzistas la ebleco plibonigi la lingvoscion kaj krome lerni aŭ perfektigi en la germana.

Eble ankaŭ du personoj samtempe povos veni, eble el diversaj landoj.

Nepre vi bezonos asekurojn (malsaneco kaj akcidento).

Ni ofertas:

- vojaĝkostojn
- restadkostojn (memzorganto(j))
- poŝmonon
- lingvan perfektigon

Pri tuja pozitiva respondo ni ĝojus. Bv. sendi vian Esperantan biografion! Anticipan dankon.

Je nomo de la EGS-estraro kaj de GEA-estraro, Peter Zilvar

Germana Esperanto-Centro/
Interkultura Centro Herzberg
D-37412 Herzberg/Harz,
la Esperanto-urbo
Grubenhagenstr. 6,
Tel. +49/(0)5521-5983; <http://herzberg.de>; www.ic-herzberg.de

Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko

This reference work has been available on the internet for more than 10 years, during which time the author has worked constantly on improving it. Now it is also available as a book with almost 700 pages.

Compared to *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto* it is less theoretical and more practical: you do not need to be an expert Esperanto-speaker to understand and benefit from its clear explanations.

However, the book is also of interest to experts. The large number of real examples, with references, provides ample material for the most demanding of linguists.

Bertilo Wennergren: *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*. El Cerrito: ELNA, 2005. 696pp. 16 x 23.5cm. ISBN 0-939785-07-2.

• Order from EAB for £16.50 (+ p.&p. at 15% £2.48) = £18.98.

JEBanoj en Barlastono, Londono ... kaj Germanio

Kvankam bedaŭrinde neniuj novaj gejunuloj aperis ĉe la kurso 'Course-You-Can' en Barlastono en oktobro malgraŭ sufiĉa avizo, tio permesis diskutadon de JEB aferoj. Mi fine povis viziti la sidejon kaj 'ĉef-urbon' de Esperanto en Britio. Sed mi ne atendis, ke ĝi estas tiom kampara, tiel ke mi tute trapasis ĝin aŭtobuse. Mi estos pli atenta sekvafoje. La Biblioteko Butler estas vere miriga, kaj la ĝardenoj kun la granda ŝtona Esperanto-monumento. Mi ŝatus ion similan ĉe mi!

Dankinde, ke la Londona Lingva Ekspozicio estis pli frekventata. EAB havis budon tie, kaj pluraj JEBanoj iris por asisti ĉe allogado de gejunuloj. Sabate ĉeestis sep junaj esperantistoj, kiuj ĉiuj helpis informi pri Esperanto ĉe la informejo. Ni alportis niajn proprajn libretojn kaj gluaĵojn por disdoni, kiel ankaŭ provizorajn ekzemplerojn de la dua numero de *S@luton*. Interese, ke mi renkontis tri knabinojn el Bjalistoko, kiuj ja sciis pri Esperanto, sed neniam lernis ĝin, ĝis mi donis al unu Esperanto-lecion. Fakte, hejme ŝi laboras rekte apud la statuo de Zamemhof.

Aliafere, ni decidis peti donacojn de patronoj por subvencii poŝtkomunikadon kun membroj kaj la verkon de flugfolioj kaj la bulteno.

Jam iom granda nombro da britoj aliĝis por partopreni en la Internacia Seminario en Germanio dum Silvestro, kaj



Fotoj: *En Londono ĉe la Lingva Ekspozicio. Sube maldekstre: Dum la semajnfino de 'Course-You-Can' kun Vivienne O'Dunne*



unu-du komitatanoj helpas kun ties distra programo. Por januaro ni organizos junularan programon por JEBanoj, kiuj partoprenos en la semajnfino 'Ni Festivalu!'.

Daniel White

Junularo Esperantista Brita / Association for Young Esperantists Ages 16-30 • Join for free online at www.novajeb.org.uk

Retpoŝta adreso: jeb@novajeb.org.uk



Calling all Patrons!

JEB has grown dramatically over the last year since we decided to let young Esperantists join the association for free.

Over the summer, members were sent paper copies of the first edition of our bulletin *S@luton* and leaflets on courses, coming events, travelling with Esperanto and other info to try to encourage young people to take a more active role in the movement. We would like to continue to do this over the long term.

You can help us by donating a small amount to help fund this endeavour. Patrons who donate over £5.00 will receive *S@luton* for the year and are welcome as observers at our AGM.

Cheque/postal orders made payable to 'Junularo Esperantista Brita', sent to Michael Seaton JEB, c/o Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE. Remember to include your name and postal address.

• **Historical article on making love**

Historian Dr John Carter Wood recently sent EAB a copy of an article referring to Esperanto in a 1920s newspaper. He wrote: 'It's quite a charming little piece, and I thought you might be interested.' He mentions it at his blog, as part of a broader discussion on serendipity and history <<http://obscenedesserts.blogspot.com/2006/07/flotsam-and-jetsam-of-history.htm>>.

Here's a transcription of the article (*Sunday Express*, 22 July 1928):

Making Love in Esperanto <<http://en.wikipedia.org/wiki/Esperanto>>

A Talk on Ices Ends in Marriage

A discussion in Esperanto on the price of ices at a dance led to the wedding at Brixton registry office yesterday of Miss Betty Barker and Mr Leonard Noel Newell, editor of *International Language*. Mr Newell and his bride are both employed by a London insurance company, and at one of the firm's dances they discovered that they both spoke Esperanto, the international language. The acquaintance ripened, and Mr Newell said to a *Sunday Express* representative yesterday that he put the greatest of international questions, 'Will you marry me?' in the language which had begun their friendship.

Esperantists' Babies

They left London yesterday for a Continental honeymoon, during which they will attend the twentieth universal congress of Esperantists, at Antwerp next month. Discussing the language as an aid to marriage a keen Esperantist at the wedding recalled the case of a Finn and German girl who met at one of the congresses, and, not understanding each other in the native tongue, conducted their courtship in Esperanto. Two young Esperantists who can speak only the international tongue have resulted from the marriage. When Mr Jackson Coleman, a London barrister, was married to Frau Muzza Schonau, an Austrian, at St George's Church, Bloomsbury, about two years ago, the service was conducted in Esperanto.

Mr Wood was thanked and sent a brief biography of Leonard Newell with a commentary on and list of his literary work in Esperanto.

Ligu vin kun la mondo Esperanta!

Ne forgesu aliĝi al UEA por la Nova Jaro!

• **Vi povas pagi membrokotizojn por EAB kaj UEA kune**

Kelkaj kotizoj de UEA por 2007

MG /Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado	£6
MJ(-T*) /Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO* (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) kun la revuo <i>Kontakto</i> sen plia abonpago)	£16
MA(-T*) /Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo <i>Esperanto</i>	£39
SZ /Societo Zamenhof: mecenata kategorio, kiu ne inkluzivas membrecon	£78

Pagu al la Brita Peranto: EAB, Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Tel. 0845 230 1887. Pagiloj estu skribitaj al 'EAB' (ne al UEA).



Kongres-aliĝoj kaj aliaj pagoj

La Peranto povas akcepti pagojn (kvankam ne per kreditkarto) ankaŭ por la Universala Kongreso de Esperanto (UK) kaj la Libroservo de UEA, por kiuj celoj la administrego de UEA eventuale malfermos por vi personan konton ĉe la Centra Oficejo (CO) en Nederlando. Bonvolu noti, ke la kongresajn kotizojn oni ne fiksas en pundoj, do ilia valoro varias laŭ la taga kurzo. Estas plej avantaĝe aliĝi antaŭ la antaŭa jarfino. La Peranto kutime disponas pri kongresaj aliĝiloj kaj la Unua Bulteno de la UK, sed ne pri librokatalogoj.

☆ **Universala Esperanto-Asocio**

Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando
Tel. 00-31-10-436-1044; www.uea.org

Ĵus aperis

Relativeco per bildoj

de Wilfrid Atkinson
– frukto de multaj jaroj da klopodado por klarigi la esencajn ideojn de Einstein kaj tiel transdoni la ĝojon de kompreno.


Por legi la tekston ne necesas universitata diplomo pri matematiko – lerneja nivelo sufiĉas. Klaraj diagramoj ilustras la ĉefajn ideojn. Pli matematikemaj legantoj trovos aldonajn komentojn kaj klarigojn en apendico.

La libro signife pliampleksigas du artikolojn de la aŭtoro, kiuj aperis en *Scienca Revuo*.

La aŭtoro estas emerita urba inĝeniero, kiu ŝuldas la kernajn ideojn al emerita instruisto Roy Kearney.

Eldonis: Wilfrid Atkinson. 104 paĝoj. ISBN 0-902756-26-5.

Distribuas: Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Tel. 0845 230 1887. £5.75 incl. p.&p.



Gratulon al Imagufilm pro la filmo Gerda Malaperis!

Ne estas multe da filmoj en Esperanto. *Gerda Malaperis!* estas nur la tria filmo en la historio de la internacia lingvo, kiu daŭras pli ol unu horon, kaj ĝi evidente estas unue edukilo por lernantoj. Tial ne estas certe, ĉu ĝi sukcesos kiel kutimaj filmoj, kvankam esperantistoj kompreneble bonvenigos ĝin.


La filmo estas bazita sur la samnoma, fama romano de Claude Piron. Nur malmulte da scenoj aŭ partoj de scenoj en la filmo ne estas en la romano. La romano mem estas verkita en simpla Esperanto por lernantoj. Tiuj, kiuj ĝuis la libron de Piron, kred-eble ĝuos la filmon.

Ĉiuj geroluloj bone aktoras. Ekzemple, Gerda mem (Lorena Leos) ŝajnas vere malĝoja, kaj ŝia plorado tute ne ŝajnas humura. Sed en la scenoj montrantaj Gerdan en mal-libereja ĉambro, la kaptinto (Kleber Veloso) ŝajnas komika, kiel pantomima fripono. Eble oni celis, ke la filmo pli bone taŭgu por infanoj.

Tamen la filmo povas distri kaj plenkreskulojn kaj infanojn, aparte junulojn, ĉar ĝi temas pri aventuroj de grupo da studentoj. Ankaŭ du infanoj rolas en la rakonto. La filmo enhavas krimon, misteron kaj amrakonton. Pri la ĉi-lastaj, iuj scenoj sugestas, ke la verkisto eble intencas sekvan rakonton. Ni vidos.

La filmo uzas variajn muzik-stilojn. La kaptinto de Gerda zumas klasikan muzikon. La sceno pri la senzorga flegistino (Michelle Reis) enhavas humuran infanan melodion. Aliajn partojn de la filmo, ekzemple la finon, akompanas moderna muziko.

La DVD mem ne estas perfekta; ciferoj aperas enmiksitaj



• The DVD of the film *Gerda Malaperis!* is available from EAB for £17.83. The book costs £4.37. Both prices include postage and packaging.

kun iom da subtekstoj. Foje pasas iom da sekundoj de tuta silento en la filmo, eĉ sen fonaj sonoj.

Krom la filmo, la DVD havas ankaŭ intervjuojn en simpla Esperanto kun la farintoj de la filmo, el kiuj oni povas lerni multe da interesaĵoj. Ili montras ekzemple, ke la filmo bezonis tri jarojn por fari. La geaktoroj ne vivis lukse dum la filmfarado – fakte ili dormis en komuna dormejo, sur la planko!

Ĉe la fino de sia libro Piron menciis kontraŭdiron en la rakonto. Mi ne estas tute certa, kion li celis, sed eblas, ke la filmo havas la saman kontraŭdiron. Se jes, ni devos vidi la filmon (kaj legi la libron) pluralfoje por trovi ĝin – kiel ankaŭ plifortigi nian Esperanton!

Gratulon al Imagufilm pro ĉi tiu verko, kaj espereble ni vidos pli da Esperantaj filmoj en la estonteco.

(Eblas eltrovi pli pri la filmo ĉe la retpaĝo www.imagufilm.org)

Miland Joshi

Altkvalita kaj amuza prezento de la nordlanda mitologio

La frakseno Igdrasil: Antikva dia historio estas traduko el la sveda originalo de Alf Henrikson. Li rerakontas en tre amuza kaj instrua maniero la mitojn kaj aventurojn de la antikvaj nordlandaj dioj, kaj pri kio laŭ ili estas la mondo, la homoj kaj la aliaj estaĵoj, loĝantaj tra la mondo.

Igdrasil estas la arbego, kies branĉaro, etendiĝanta tra la tuta mondo, entenas kaj subtenas la hejmojn de la dioj, la homoj, la gigantoj, la nanoj kaj la mortintoj.

Grava kaj esenca parto de la rakontado estas la bele amuzaj





desegnoj de Edward Lindahl. Ili perfekte akompanas kiel krenkremaĵo al krudspicita salmo.

La libro estas en la longa tradicio de fabeloj por plenkreskuloj, do ne porinfana, kvankam ĝi neniel maltaŭgus por pli aĝaj infanoj.

La traduko estas ege bona, kaj la unu-du demandoj estas apenaŭ menciindaj.

Mi povas varme rekomendi la libron.

Geoffrey Sutton



• *La frakseno Igdrasil: Antikva dia historio* de Alf Henrikson kaj Edward Lindahl. Tradukis el la sveda Bertil Nilsson. Stokholmo: Eldona Societo Esperanto, 2005. Broŝurita, 138 paĝoj, 23cm. ISBN 91-85288-33-0.

Nova KD de Mikaelo Bronŝtejn

Certe multaj konas la rusan poeton, muzikiston kaj kantiston Mikaelon Bronŝtejn. Jen kelkaj novaĵoj pri li.

Jam partopreninta en preskaŭ la tuta kolekto *Oraj Kantoj*, kaj krome per sia solo-albumo *Esperantujo mia*, sia kunlaboro kun Elena Puhova, la tuta tekstaro de *Amu min* de Ĵomart kaj Nataŝa, kaj kelkaj tekstoj de la albumo *Ukrainaj kantoj en Esperanto*, Mikaelo estas ja la plej fekunda el niaj orienteŭropaj artistoj.

Dek ses novaj kantoj, el kiuj nur unu jam estis antaŭe registrita, alvenas por pliriĉigi tiun impresan aron da laŭdindaĵoj kaj estas proponitaj en tiu nova KD, tiel riĉa je tekstoj kiel bone komponita kaj aranĝita.

Ĉu poeto, ĉu muzikisto? Certe ambaŭ. Sed Mikaelo taksas tute aparte la tekstojn kiel gravajn kaj

konfidas al ni: 'Poemo devas esti evento, ne priskribo de tiu,' ... la muziko estante dekoro por la fabeloj, dramoj, ŝercoj, satiroj kaj aliaj pamfletoj, kiujn Mikaelo dediĉas al Puŝkin.

Por la registrado, Mikaelo kunigis ĉirkaŭ si Evelinan, Tatianan, Veran kaj Printempon, la ĉefan inspirantinon, kiu ankaŭ sugestis la titolon, *Printempo bluĵinsa* [= bluĝina?] (VKKD83).

Mikaelo emas serĉi kaj eltrovi printempan humoron en la rutina temp-iro kaj eĉ eventojn ne tre agrablajn trakti kun rideto – kaj tion li sukcesas tre bone.

Ne hezitu konsulti la amason da referencoj pri Mikaelo Bronŝtejn en la rubrikoj 'Tradicio - Folkloro' kaj 'Lirikaj kanzonoj - Ĥoroj' ĉe Vinilkosmo. Por aŭskulti fragmenton aŭ rekte mendi: www.vinilkosmo.com.



• **Whole column in Stoke paper**

A full column in Stoke-on-Trent's newspaper *The Sentinel* was 'Triggered by the death of the distinguished Esperantist William Auld.' It appeared on 24 September, reminiscing on Stoke's past connections with Esperanto.

• **Torino, Italio: loĝejo por studentoj je favora prezo**

Ĉu vi devas staĝi aŭ 'Erasmus-umi' en Torino? Ekde nun la olimpika urbo ofertas al vi kroman eblecon: restadi dum longdaŭraj periodoj en la Esperanto-Centro je tre favora luprezo. La Esperanto-Centro troviĝas ĉe la Fakultato pri Ekonomiko kaj Komerco, je dek kvin minutoj el la urbocentro per urbaj trafikiloj. Interesitoj sin turnu al Rosanna Perottino: tel. +39.3392170617 aŭ <zorion99@libero.it>.

• **Peticio por Esperanto**

Ĉe la retpaĝaro <http://www.petitionspot.com/petitions/Esperanto> eblas subskribi peticion por Esperanto al Unuiĝintaj Nacioj. Ŝajnas tamen, ke la iniciatintoj ne aŭdis pri la jama granda peticio al UN, prezentita en oktobro 1966 (vidu la prikskribon en *Esperanto en perspektivo* (1974), paĝoj 778–91).

• **Aŭskultu perrete Radion Pollando**

Vi povas, ekzemple, aŭskulti la intervjuon kun la urberstro de la Esperanto-urbo Herzberg Gerhard Walter ĉe http://www.polskieradio.pl/_admin/cm/polonia/_sekcja156/_audio/urbestro.mp3, kaj alian raporton kun la kunlaborantoj de Interkultura Centro Herzberg ĉe http://www.polskieradio.pl/_admin/cm/polonia/_sekcja156/_audio/E-Centro en Herzberg_P.Zilvar kaj Z. Korody.mp3. Kaj – plie al la informoj sur paĝoj 6 kaj 7 – la plej lasta informo estas, ke denove eblas aŭskulti Esperantajn programojn per la radio, do nepre faru – kaj, plej grave, reagu perrete kaj letere.

• **Okaze de**

la Tago de Lingvoj
Aperis en 2006 ĉe la sveda komitato por la Tago de Lingvoj (26 septembro) 24-paĝa broŝuro por gejunuloj *Med språk kommer du längre* (Per lingvoj vi venas pli longe); formato 11x19cm. Ĝi prezentas 24 lingvojn, inkluzive de Esperanto. Eldonis ĝin la Oficejo por la Oficialaj Eldonaĵoj de EU kaj financita de la Eŭropa Komisio. Ĉu ĝi eble estas la unua eldonaĵo de EU, kiu aperas parte en Esperanto? Kaj ĉu britoj povas fari simile? La broŝuro haveblas ĉe <http://publications.europa.eu>. Jen dekstre la pri-Esperanta paĝo.



• **EAB-Ĝisdate populara interrete**
Laŭ ricevitaj statistikoj, la pasintaj numeroj de EAB-Ĝisdate estas inter la plej popularaj paĝoj en la retpaĝaro de EAB. Bedaŭrinde, ĉar la dosieroj ankaŭ estas grandaj, la elŭtado de la dosieroj foruzas grandan parton de la havebla kvoto da bajto-transportado. Ĉi tio tamen estas interna administra problemo, kiun niaj kompetentuloj nun luktas solvi. La plej lasta numero de EAB-Ĝisdate aperos en la hejmpaĝaro de EAB nur proksimume monaton post la papera apero.

• **Estu UMEA Jubilea Subtenanto de UMEA**

En 2008 UMEA (Universala Medicina Esperanto-Asocio) festos sian 100-jaran fondiĝdatrevenon. El tiu okazo UMEA invitas kaj petas, ke vi estu 'Jubilea Subtenanto' de UMEA. La kotizo estas 100 eŭroj. La

subtenantoj ricevos la ĵus-aperintan, pli ol 500-paĝan eldonaĵon *Esperanta–Angla Medicina Terminaro*, abonon por la organo de UMEA, *Medicina Internacia Revuo*, dum 2007–08, kaj en jaro 2008 memorinsignon kaj memordiplomon. La subtenantoj favorpreze rajtos partopreni nian jubilean festan konferencon en Krakovo, Pollando. Pri la aliĝoj, pagmanieroj ktp. bonvolu skribi al: d-ro Imre Ferenczy, prezidanto de UMEA, Pf. 143, HU-9002 Gyor, Hungario; retpoŝte: iferdr@t-online.hu.

• **Ĉi-jara FAME-premio al Herzberg**

La konata kulturpremio FAME – kun 5 000 eŭroj – de la urbo Aalen estas aljuĝita al Germana Esperanto-Centro kaj Esperanto-Societo Sudharco en la Esperanto-urbo Herzberg.

La urbestro de Herzberg, Gerhard Walter, mem bon-humore kaj fiere akceptis la laŭdadon en la urba biblioteko de Aalen. La prezidanto de FAME-fondaĵo, Herbert Mayer (estro de la Esperanto-Muzeo en Vieno), kaj la prezidanto de Germana Esperanto-Asocio, Andreas Emmerich, ege laŭdis la konstantan kaj sukcesan agadon en Herzberg. Urbestro Gerhard Walter nun lernas Esperanton.

La Esperanto-Centro (ĉe www.ic-herzberg.de) ege dankas ĉiujn, kiuj subtenis ilian ĝisnunan agadon, tiel helpante atingi bonajn rezultojn.

• Lancashire events

On 28 September the *Lancashire Evening Post* published details of the South Lancashire Esperanto Group's autumn and winter programme. Other local papers are happy to do this too! 

delegitoj de UEA, kiujn mi reprezentas.

Avantaĝo kun tiaj homoj estas, ke ilia verko pluvivas post ilia morto; do eĉ se William ne plu estas inter ni, ni daŭre povos dividi pensojn kun li, legante liajn poeziaĵojn.

Renée Triolle,

Ĉefdelegito de UEA por Francio



RETE KAJ LETERE

BY E-MAIL AND LETTER

Helpu nin! Alvoko al loĝantoj de Fareham kaj ĉirkaŭaĵo

Bonan tagon,

Mi estas sekretario de societo, kiu nomiĝas 'Esperanto-Vannes'. Mia urbo, Vannes (Francio), estas ĝemelo kun la angla urbo Fareham, Hampshire. Ofte loĝantoj el Fareham vizitas nian urbon kaj reciproke. Tial mi estus tre kontenta, se vi povus sendi al mi adreson, retadreson de societoj aŭ homoj loĝantaj en Fareham aŭ ĉirkaŭaĵo.

Antaŭdankojn.

Pierre Jaffré

<pierre.jaffre56@orange.fr>

Redaktora noto: Tiuj, kiuj interesiĝas pri urbaj ĝemeligoj,

eventuale povus havi utilon el la 'Informilo de Ĝemelaj Urboj', kiu estas reta revueto de UEA. Ĝin redaktas Wu Guojiang, adreso: Fushun Shiyouyichang Yanjiusuo, CN-113008 Fushun, Liaoning, Ĉinio. Tel./fakso: +86-413-2650322 (post la kvina sonoro); retadreso: amikeco999@21cn.com, ghemelurboj@yahoo.com.cn.



Sinceraj kondolencoj

Estimataj,

Mi eksciis pri la forpaso de William Auld kaj sincere kondolencas nome de la francaj

El la historio – kimro kontribuis al la frua Esperanto-movado en Japanio

Edward Gauntlett (1868–1956) naskiĝis en Kimrio, unue iris al Kanado kaj Usono kaj poste venis al Japanio en 1890, kie li instruis la anglan lingvon en diversaj lernejoj, kaj intertempe servis kiel orgenisto de la Centra Preĝejo Hongĝe, Tokio.

En 1903, kiam li estis instruisto ĉe la Sesa Nacia Kolegio en Okayama, li memlernis Esperanton kaj baldaŭ komencis instrui la lingvon hejme kaj per korespondaj kursoj, por kiuj li sukcesis varbi pli ol 600 lernantojn.

En 1906, kiam oni fondis la tutlandan organizaĵon Japana Esperantista Asocio, li senkondiĉe donis liston de siaj lernantoj, kaj tiel helpis la organizaĵon. Li verkis unuajn librojn por japanlingvanoj: vortareton *A Short Vocabulary English–Esperanto and Esperanto–English* kaj lernolibron *Esperanto sekaigo* (mondolingvo), ambaŭ en 1906. Li tiel kontribuis al la japana Esperanto-movado en ĝia plej frua periodo. Fama muzikisto, YAMADA Kēsaku, frato de lia edzino YAMADA Tune (Cune), estis ankaŭ edukita de li en Okayama pri Esperanto kaj muziko. Li tiel vartis ankaŭ eŭropan muzikon en Japanio. Li akiris japanan ŝtatanecon en 1941 kaj mortis en Tokio.

(Dank' al s-ro MINE Yositaka)

Dezirata korespondi

Karaj amikoj,

Mi estas Ilona, mi estas polino, mi havas 39 jarojn. Mi loĝas en malgranda urbo Bobolice, en nordokcidenta Pollando. Mi lernas Esperanton.

Mia edzo loĝas kaj laboras en Britujo, en Plymouth. Mi volas ekkontakti kun britaj amikoj por ekkoni vian belan landon, kaj lerni Esperanton.

Mi atendas viajn respondojn.

Ilona Korzekwa
<ilonak67@wp.pl>



Enketo pri amianto

Kara samidean(in)o,

Margene de la agado de internacia laborgrupo pri sekureco en laborejoj, loka reprezentanto de 'Ban Asbestos' proponis kolektadon de informoj por studi nivelon de kono pri la danĝeroj de amianto ĉe nefakuloj; aparte gravas taksi konon pri:

- a) riskoj por la sano
- b) valida normaro
- c) realigo de iloj (ĉu teknikaj, ĉu juraj) por protekti la loĝantaron kaj la laboristojn.

Tiu ĉi enketo koncernas ĉiujn landojn, sed konsideras ĉefe la situacion de la evolulandoj pro ilia pli granda malforteco en la premado de la merkato.

La enketon oni proponis al Bolonja Esperanto-Grupo pro la konektoreto de Esperantujo, kiu ebligas atingi multnombrajn personojn en multaj landoj.

Tiu ĉi enketo plenumiĝos per retpoŝto: ni sendos demandaron kompletigendan kaj resendendan; poste oni taksos la

enhavon de la respondoj.

Ĉiujn informojn oni igos sennomaj, kaj identeco de respondintoj neniam estos rekonebla.

La esplorado celas diskonigi la percepton pri amiantorisko, kaj krome intencas taksi

ĉ) Esperanton kiel internacian kontaktilon por kolekti informojn, kaj

d) Esperantan komunumon kiel interparolantaron por sciencaj celoj.

Rezultojn de ĉi tiu rilato de esplorado oni diskonigos en Esperantaj amaskomunikiloj, per propono de kongresaj prelegoj kaj de artikoloj en revuoj.

Ĉiujn rezultojn oni komunikos al la partoprenantoj kaj al la kunlaborintoj. La studado, plue, produktos doktoran disertacion ĉe la Fakultato pri Modernaj Lingvoj de la Universitato de Bolonjo. Do, oni petas:

- ke vi subtenu la studadon;
- ke vi havigu al ni retroŝt-adresojn de esperantistoj, al kiuj ni rajtos sendi la demandaron;
- ke vi informu pri la esploro;
- ke vi ankaŭ plenigu persone la demandaron al vi sendotan.

Ni ĝoje fidas vian helpon kaj dankas vin tre kore.

Bolonja Esperanto-Grupo
'Achille Tellini 1912', Italo
Prezidanto, d-ro Daniele
Agostini; rete:
gesperbo@iperbole.bologna.it



Peto de nova grupo en Tours

Karaj gesamideanoj,

Bona novaĵo en Tours! La 5-an de oktobro, mi sukcesis starigi Esperantan klubon en mia kolegio. Ĉiuj aŭde partoprenas la kurson 6 personoj: 4 gelemantoj kaj 2 geinstruistoj.

Jen mia peto: Por pruvi, ke Esperanto estas vivanta lingvo, mi petas de la tutmonda esperantistaro sendi kuraĝigan bildkarton al la suba adreso. Sur tutmondan mapon mi fiksos

kolorajn pinglojn por signi, de kie venas la ricevataj poŝtkartoj. Ni montros la tuton dum publika tago en marto 2007.

Ĉu vi konsentus fari tion? Ĉu vi povus paroli pri tio al via loka grupo, al viaj korespondantoj?

Jen la adreso: Institution Notre Dame-St Vincent, Club d'Espérance (D. Baron), 30 rue Delperier, BP 5813, FR-37058 Tours Cedex 1, Francio.



Lingva temo de la monato

Saluton,

Ekde junio de 2004 ni ĉiunmonate prezentis novan 'Temon de la Monato' ĉe *Lingva Prismo*, www.lingvo.info. Vi tie diskutis pri multaj diversaj temoj, kiel ekzemple ortografiaj reformoj,

dulingvismo, plej taŭgaj lernometodoj aŭ interkultura lernado.

Ĝis nun estis la redakt-teamo de *Lingva Prismo*, kiu ĉiun monaton elektis novan temon. Nun, post 25 temoj, ni ŝatus demandi al vi, kiujn temojn vi ĉiam atendis kaj kiujn ŝatus diskuti.

Do ni petas al vi sendi viajn proponojn. Ili povas esti komplete verkitaj temoj, nuraj demandoj, ideoj aŭ aferoj, kiujn vi ĉiam ŝatus scii pri lingvoj. Ni prezentos la plej interesajn proponojn kiel temojn de la venontaj monatoj. Vi trovas la temon de la monato ĉe <http://www.lingvo.info/forumo/?lingvo=eo>.


Cornelia Blome
Redaktorino de *Lingva Prismo*
www.lingvo.info
cornelia@lingvo.info

En 1987, dum la Brita Esperanta Jubilea Festo, oni prezentis en Londono la faman teatraĵon de Oscar Wilde *La graveco de la fideleco* en Esperanta traduko de William Auld. La prezento estis filmita kaj eldonita sur vidbendo; nun, dank' al la teknikaj kapabloj kaj diligenta laboro de Simon Davies, ni disponas ĝin ankaŭ sur DVD-oj.

La nova teknologio donas novan utilon: spektante la DVD-version, oni povas laŭvole ŝalti la subtitolojn kaj elekti subtitolojn en Esperanto aŭ la angla.

Du diskoj,
daŭre entute: 145 minutoj. *Lingvo:* Esperanto. *Subtitoloj:* Esperantaj, anglaj. *Regionoj:* ĉiuj. *Normo:* PAL (625 linioj/50 Hz).

Mendu de EAB kontraŭ £11,75 + 1,65 (sendokostoj en Britio) = **£13,40**. EAB, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE, aŭ de la TTT-ejo: www.esperanto-gb.org



SPECIAL January Book Offer – postage free, a saving equivalent to 15%!

Anglaj Prepozicioj en Esperanto J.W. Prent SATEB, Romford, 1987. 20p. 21cm. Advice on translating – traps with English prepositions. £1.00

Aŭstralio Felix Trevor Steele Vienna, 1999. 132p. 23cm. Stories from Australia, past and present. £6.50

Ĉashundo de la Baskerviloj Conan Doyle. Trans. by William Auld. Jekaterinburg, 1998. 168p. The famous Sherlock Holmes mystery. £2.60

English Phrases and Expressions in Esperanto Felix Woolf Ontario, Canada, 1989. 120p. Paperback; reference of colloquial English expressions, and their translations into Esperanto. £3.50

Esperanto: Language, Literature, and Community Pierre Janton. Trans. from the French and rev. by Humphrey Tonkin. Albany, USA, 1993. 168p. General introduction to Esperanto and its role in the modern world. £9.50

Falantaĵ Muroj Trevor Steele Vienna, 1997. 160p. 23cm. Paperback. Collection of original stories, describing the author's experiences in the Soviet Union, Poland and the former German Democratic Republic in 1990–1. £10.50

Klera Edzino Upendronath Gangopaddhae. Trad. P. Daŝgupto. Pisa: Edistudio, 1995. 182p. Romano pri la rilato de viro al edzino pli klera ol li. £7.68

Kulturo kaj Teknologio Andrew O. Urevbu. Trans. by J. Rapley. Rotterdam, 1997. 63p. 21cm. Discussion on transplanting technology to other cultures, in the context of the Unesco Decade for Cultural Development. £3.00

Norda Odiseado kaj Aliaĵ Rakontoj Jack London. Trad. F. de Diego. Chapecó: Fonto, 1988. 111p. 21cm. Stories of a man's struggle with nature. £4.42

Rikolto Juan Régulo Pérez. Chapecó: Fonto, 1992. 596p. 21cm. Essays on Esperanto, philosophy, etc. plus 30 reviews. £23.00

- Please add 15% for postage & packing to the titles below:

Books by Claude Piron (Johán Valano, Balano)

Bona Lingvo, La Claude Piron. Vieno, 1997 110p. Paperback. Eloquent plea for the richness of spoken Esperanto, based on psychological, stylistic and social considerations. £9.60

Ĉu Li Venis Trakosme? Johán Valano. La Laguna / Antwerp, 1980. 21cm. 144p. Novel – spies, murders and intrigue. £5.50

Ĉu Ŝi Mortu Tra-fike? Johán Balano. Vienna, 2000. 74p. 23cm. Novel – 'crime and sex fantasy' in well-written but not-quite-decent language. £7.00

Ĉu Vi Kuiras Ĉine? Johán Valano Vienna, 1996. 135p. 23cm. Detective novel, first in the series; amusing reading for 'progresantoj'. £9.00



Dankon, Amiko Claude Piron. Budapest, Hungara Esperanto-Asocio, 1990. Paperback. 36p. 20cm. Easy, but stimulating read from Claude Piron about a naïve young man. £2.90

Dorsosako de Panjo Rut', La Sándor J. Bako & Claude Piron. Vienna, 1995. Short stories about ordinary people in special circumstances. £7.35

Gerda Malaperis! Claude Piron Chapecó: Fonto, 1983. 48p. 21cm. Mystery story in elegant but limited vocabulary to aid learning. Also see *Gerda Malaperis – la filmo* in the DVD section. £3.80

Gerda Malaperis! Vortlisto Claude Piron EAB, 2005. 28p. 21cm. English wordlist to accompany the book of the same name. £2.30

Hidden Perverse Effects of the Current System of International Communication, The Claude Piron Esperanto documents 48a. Booklet describing the work, organisation, culture and history of the movement for the adoption of the international language. £1.90

Ili Kaptis Elzan Johán Valano. Chapecó: Fonto, 2001. 85p. 21cm. Humorous detective novel written in 'easy' Esperanto. £6.50

Lasu Min Paroli Plu Claude Piron. 3rd ed. 2003. 126p. Paperback. Short stories, each paralleling a chapter of the *Elementary...!* course book, *Gerda Malaperis!* re-using its words and grammar in an entertaining way. £8.60

Vere aŭ Fantazie Claude Piron. Collection of stories from around the world, arranged so readers gradually improve their vocabulary. £9.00

Titles by Paul Gubbins

Heksakloro Unu Komo Tri Paul Gubbins. Chapecó: Fonto, 2005. 62p. 21cm. Tragedy about a family caught up in industrial poisoning of the environment. Winner at 2005 UEA literary competition. £2.80

Konto de l' Vivo Paul Gubbins. Antwerp, 1998. 139p. 21cm. Four short plays; witty but also addressing current social problems. £9.00

Kunvojaĝu Paul Gubbins. Pisa, 1993. 239p. 22cm. Designed for class use with emphasis on business and practical use of Esperanto. £8.64

Rubenaj Refrenoj Ed. Paul Gubbins. A collection of six essays in honour of 40 years of the Esperanto Summer School at Barlaston, with contributions from Paul himself, Marjorie Boulton, Bill Simcock, Anna Lowenstein, Tim Carr and Renato Corsetti. £6.20

Verdaj Voĉoj Paul Gubbins. An interactive listening CD-ROM. Eight video clips of the famous and not-so-famous speaking Esperanto; accompanying exercises to aid comprehension. Excellent for 'tuning-the-ear' and for getting to grips with spoken Esperanto. £7.00

Verda Ranaro Prezentas..., La Paul Gubbins 2006. 40p. 21cm. Two one-act plays, both prize-winners in the 2004 Esperanto literary competition. In 'Mikael kaj la monstro' a man suffering from motor-neurone disease is plagued by an irreverent chorus; in 'Pacaj Batalantoj' the Esperanto community is presented with a tremendous opportunity to advance the language – but at a price. £3.50

Zam- Zam- Zamenhof Paul Gubbins. Rotterdam, 2006. 87p. 21cm. Play in three acts, taking a humorous, lively and touching look at events in the life of Ludovic Zamenhof. £6.25



New Items

Gaela Lingvo en Skotlando, La Girvan McKay Motherwell, 2005. 34p. 21cm. Introduction to the Scottish Gaelic language, incl. specimen texts from published Gaelic literature (with trans.). £2.50

Handbook of Volapük Andrew Drummond. Edinburgh, 2006. 320p. Paperback. Comic novel set in 1890s' Edinburgh, on a struggle between the supporters of Volapük and Esperanto. In English (with an occasional Volapük lesson). £9.99

Interpopola Konduto Edmond Privat. Czeladz, 2006 (2nd ed.) 142p, 21cm. Psychological study on international problems and the difficult road to peace, written in 1934. £9.25

Lingvo kaj Popolo H. Tonkin. Rotterdam, 2006. 159p. 21cm. Considered study of the current problems facing the Esperanto movement, by a former president of the World Esperanto Association (UEA). £9.80

Ordeno de Verda Plumo: Leksikono pri Esperantlingvaj Verkistoj Josip Pleadin. Đurđevac: Grafokom / Esperantlingva Verkista Asocio, 2006. 272p. 25cm. With biographies of 901 authors, 248 pseudonyms and 461 photos – an invaluable resource for all researchers in Esperanto literature. £20.25

Poŝamiko Allée & Kováts. The Hague, 2006. 40p. 15 cm. Pocket-sized picture dictionary for beginners, illustrating 40 everyday themes ('the body', 'drinks', 'clothes', 'animals', etc.) in full colour. Includes grammatical summaries, short texts, and several exercises. £4.30

Salutu la Sinjorinon Tome & Janry Paris, 2005. 47p. 30cm. The first adventures of Young Spirou; a Belgian comic strip in the style of Tintin and Asterix. Trad. S. Merlet & J. Lazert. £6.55

Tabuaj Vortoj en Mondlingvo (CD-ROM) Don Lord. EAB, 2006. Lecture on taboo words (50 min. film), *Sekretaj Sonetoj* by Kálmán Kalocsay (text file) and a rude-words mini-dictionary (text file). No. 2 in the EAB 'education resources' series. £3.50 (incl. p.&p.)

Orienta Federacio kunvenis en Maldon

La Orienta Federacio regule kunvenas diversloke en sia vasta regiono, plejofte en Colchester, Witham, Braintree. Je la 28-a de oktobro ĝi kunvenis en Maldon.

Kiel kutime, okazis unue instruado kaj, samtempe, promeno tra la urbo. Tiuj, kiuj elektis promeni, sekvis la informilon, kiun kiel kutime preparis Roy Simmons, kaj vidis survoje la preĝejon de Sankta Maria kaj ĝian lignan turon kaj sekvis la ĉefstraton, kie troviĝas multaj tradiciaj kaj malnovaj konstruaĵoj. Ni preterpasis 'The Hythe', de kie barĝoj pli frue portis farunon al Londono kaj revenis plenaj de ĉevalfekaĵo por la kampoj. Ni sekvis la riveron Chelmer, preterpasis centron de la antaŭa ferindustrio kaj aktivan salfabrikon. Ni vidis trinkejojn el la 15-a jarcento kaj preĝejon de la 13-a, al kiu, pli ol 100 jarojn post konstruado, oni iom malatente aldonis turon, nur tri-flankan. Dektri-jarcenta ŝajna trinkejo reale estas biblioteko! Malgraŭ la reputacio de la regiono, la vojoj estas deklivaj, ĉar Maldon troviĝas sur monteto.

Sekvis bona manĝo preparita de la prezidanto Roy Simmons, prelego de Terry Page pri sun-energio kaj lia propra sperto pri instalado kaj la sekvaj kontentigaj rezultoj. Poste ni ludis 'Skramblon' ĝis temaĝo. Tre bonvena estis la ĉeesto de Bernice Scott, post serio de san-problemoj, de Joyce Bunting el fora Harpenden, kaj nova lernantino, kiu partoprenas en la sama U3A grupo kiel nia membro Peter Kelton-Groves.

Ĉiu urbo havas siajn individuajn geografion kaj historion. Per partopreno en tiaj renkontiĝoj, (ne nur en la propra regiono) mi konatiĝis kun multaj urboj en Anglujo kaj Skotlando, kiujn alie mi neniam vizitus.

Norah Brown



• La 11-an de novembro **Sud-Lankaŝira Esperanto-Grupo** kaj amikoj de la grupo renkontiĝis ĉe Friends Meeting House en Southport. Ĉeestis ankaŭ du eksterlandaj esperantistoj, el Italio kaj Estonio: (de maldekstre, malantaŭe) Peeter Aitai, Andrew Wheatley, Brendan Marsh, Daniel White, Francesco Maurelli; (antaŭe) Richard Phoenix, Vivienne Isherwood, Ian Mac Dowall, Jim Voels.

Yorkshire & Humberside Federation Seminar in York

The Yorkshire and Humberside Federation will be organising a seminar in York on 23 June 2007. It will be led by Dr Paul Gubbins and is open to all who want to improve their use of Esperanto. Further information is available from A. Duerden, 1 Grove House Drive, Bradford BD2 4DS. Tel. 01274 639888.

Travel together to Esperanto holiday in Poland

Ian Mac Dowell, Roy Simmons and Eric Walker, all well-known travellers using Esperanto, are combining to organise a group to go to the popular annual international holiday at Mielno on the Baltic Coast in Poland. The dates are 12–20 June 2007. Total cost incl. travel by air and rail is likely to be about £240. Contact Eric Walker: tel. 01473 717088; ericwalker@gn.apc.org.

Obituary

David Withey died peacefully in his sleep on Sunday, 29 October 2006, aged 85. He never really regained full health after his heart attack about 18 months ago, although he did manage to take part in some of the local meetings last year. He had been leader of the Liverpool Esperanto Circle for many years and acted as tutor for the correspondence courses, as well as meeting and corresponding with Esperantists worldwide. He will be sadly missed by all.

David was virtually a lifelong Esperantist, and until recently was treasurer for the Skolta Esperanto-Ligo, promoting Esperanto in the Scouting movement. David took part in many international Esperanto events, the most recent being in 1992 to the World Esperanto Congress in Vienna, and afterwards to the Scouting Jamboree there.

The funeral took place on 2 November at St Mary's Church, Waterloo Park, Liverpool.

Ian Mac Dowall

Orienta Esperantista Federacio invitas vin al ...

la 4-a Esperanta Semajnfino

ĉe Felixstowe Ferry 16–18 februaro 2007

Ĉe la limo de Felixstowe, en orienta Anglio, apud la maro kaj la rivero Deben staras la Ferry Centre, kie jam okazis tri Esperantaj semajnfinoj, de 1999 ĝis 2001.

En februaro 2007 Roy Threadgold, el Braintree, Essex, gvidos porkomencantan kurson, kaj Petro De Smedt, el Belgio, estros kurson por progresantoj kaj spertuloj. Petro estas denaska esperantisto, kompilis la plej bonan vortaron nederlandan-Esperanto-nederlandan kaj okupiĝas pri la eldona agado de Flandra Esperanto-Ligo. Li jam instruis Esperanton en Francio kaj Slovakio kaj en universitatoj en Taĝikio kaj Aŭstralio.

La kursoj komenciĝos je 5.30 ptm vendredon la 16-an de februaro kaj finiĝos je 4.00 ptm dimanĉon la 18-an.

La kursejo havas ŝiplitojn en du dormĉambroj kaj provizas per kapkusenoj, sed partoprenantoj devas alporti proprajn littukojn aŭ dormsakojn. La kosto estos £67 por la tuta semajnfino, sed por tiuj, kiuj preferas pli luksan ĉambron, estas ebleco aranĝi propran tranoktadon en loka gastejo (listo de lokaj gastejoj estas havebla). Tiukaze la kosto estas nur £57 por la kurso. Tiuj, kiuj loĝas apude kaj deziras partopreni nur la sabatan aranĝon, povas pagi nur £17. Bonvolu plenigi kaj tranĉi aŭ kopii la suban aliĝilon kaj sendi ĝin, kun pago, al: Roy Simmons (ĉekoj pagendaj al li): 'Esperantujo', 12 Packard Place, Bramford, Suffolk, IP8 4HA. Tel. 01473 461346

Mi deziras mendi lokon en la 4-a Esperanta Semajnfino ĉe Felixstowe Ferry (16–18 februaro 2007). Mi kunsendas la sumon de £..... por (bonvolu hoki kaj indiki nivelon):

- ☐ Tuta semajnfina kurso ĉe la centro (£67)
- ☐ Semajnfina kurso, sed mi aranĝos propran loĝejon (£57)
(☐ bonvolu sendi liston de lokaj gastejoj)
- ☐ Sabata kurso sen tranoktado kaj vespermanĝo (£17)
- Mi mendas lokon en la kurso por:
☐ komencantoj, ☐ progresintoj/spertuloj

Nomo Subskribo

Adreso

..... Tel.

• Esperantaj reklamĉemizoj

Ĉe la repaĝo de Peter Weide, www.esperantocxemizo.1go.dk aĉeteblas du specoj de ĉemizoj kun la surskribo 'esperanto lingvo internacia'. Li estas la UEA-delegito en Melby, Danlando. Lia retadreso estas: peter.weide@get2net.dk.



Membership

New Members

M. Cayley, Hayling Island
Ms M. Florence, Cheltenham
D. Frost, Portsmouth
Luiz Grasso, Redhill
M. Morris, St. Albans
Kaori Nagai, Canterbury
Frazer Newbould, Chester
G. Porilo, London

Deceased

R. Finlay, Edinburgh
Hilda Gustin, Stroud
Sue May, Wellington
David Withey, Liverpool

Invito el Ukrainio

19-a Esperanto-festivalo

Aroma Jalto, Krimeo

29 aprilo–9 majo 2007


Ukrainiaj esperantistoj invitas vin viziti la plej belan urbon de Ukrainio. Tie en Krimeo vi ripozos anime kaj fizike en Esperanto-etoso kaj belegaj pejzaĝoj. Tio estas Aroma Jalto – tradicia E-festivalo.

• **Programo:** Seminarioj por Esperanto-instruantoj; lingvaj diversgradaj kursoj; 'universitato'; ekskursoj, piedmarŝoj; koncertoj; klubo de gajaj kaj spritaj.

• **Eventualaj prezoj:** Loĝado: en 2-litaj ĉambroj kun luksaĵoj, kontraŭ 8 eŭroj; en 3-litaj ĉambroj kun luksaĵoj, kontraŭ 7 eŭroj; en 4-litaj ĉambroj sen luksaĵoj, kontraŭ 5 eŭroj; en 5-litaj ĉambroj sen luksaĵoj, kontraŭ 4 eŭroj. Loĝado ne estas ebla sen manĝado. Manĝado 3-foja, kontraŭ 8 eŭroj. Kontribuantoj al la programo havos rabaton laŭ interkonsento.

• **Lingva ordo:** Tradicie severa. Nulaj komencantoj ne estas akceptataj. Dum la registrado ĉiu partoprenanto memstare plenigas la aliĝilon kaj respondas simplajn demandojn.

La aliĝkotizon bonvolu sendi al s-ro Volodimir Hordijenko ĝis la 1-a de marto 2007: UA-01133, Kijiv-133, p.k..35, Ukrainio; tel./fakso (044) 285 17 01; rete: volodimir_h@yahoo.com.



Conversational Esperanto / Ĉiutaga Esperanto

A series of lively dialogues from everyday life by Don Lord.
With illustrations by Peter Oliver.

- Don Lord, who learnt Esperanto in 1941 and celebrates his 80th birthday this year, has kindly given permission for EAB to publish his 'Ĉiutaga Esperanto' articles in book form: *Conversational Esperanto / Ĉiutaga Esperanto*. The articles originally appeared over the years in *La Brita Esperantisto* and (a few) in *EAB Update*, but have been arranged into categories and slightly edited for this edition.

- For those readers who are not already familiar with Don Lord's 'Ĉiutaga Esperanto', these are short texts, mostly dialogues, written in lively, everyday Esperanto and designed for learners who would like to improve their fluency. The topics covered are everyday ones, and the style is colloquial, but neither the vocabulary nor the grammar is simplified. However, even relatively inexperienced users of Esperanto can learn from them as the more difficult terms are followed by an English translation in brackets, and many of the texts also have notes.

- The book also includes a foreword by Marjorie Boulton and Esperanto–English and English–Esperanto vocabularies with page-number references to where the terms appear in context.

Don Lord: *Conversational Esperanto – Ĉiutaga Esperanto*. Barlaston: EAB, 2006. 200pp. Illus. A5. ISBN 0-902756-22-9. • **Order from EAB** for £9.00 + £1.35 (p.&p.) = £10.35. EAB, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE or online at www.esperanto-gb.org.

'Never volunteer!'

That's what they used to say in the Army, in the days of National Service. Well, whether it's good advice or not in the Army, it certainly isn't in EAB.

EAB, of course, is a *voluntary* organisation. Sure, Viv looks after the Office (and all that it containeth) as our sole employee, and Angela is retained on a consultancy basis to look after *Springboard* and all our other educational activities; but *everything else* – tutoring, the Butler Library, the website, publications, congresses, publicity, Buchanan, *bendoteko*, NoJEF, second-hand books, clubs, federations, etc., etc. – is done by volunteers, ordinary members and supporters, like you and me. However, as time passes, people move on, circumstances change, new tasks appear, so we need a steady supply of new volunteers to keep the show on the road.

Don't imagine that you're 'not the type'. *Everyone* can do something, even if it's just stuffing envelopes or keeping in touch with new recruits. Everyone has a particular skill, a particular aptitude; put them all together and – *Hey presto!* A *voluntary organisation!*

So, if you could spare a little time (even a few hours a year helps), would like to do something, and are not already in the Volunteer Network, then *please* complete the form enclosed with this issue of *EAB Update* and return it, just as soon as you can, to me at the address on the form. And if you're not sure whether you are still in the Network, or your circumstances/preferences have changed, then fill it in anyway. I have written to everyone in the Network, inviting them to update their details, but who knows, maybe I missed you.

Thanks.

David Kelso

Invitation: Scottish Congress 2007

This year's Scottish Congress will take place in the historic market town of Lanark, actually in the 16th century Tolbooth, 15–17 June.

The guest speaker will be Vladka Chvatalova, from the Czech Republic, a former Secretary of TEJO, now a translator with the European Commission in Brussels. The programme includes an excursion to the Unesco Heritage Site of New Lanark, the scene of Robert Owen's historic experiments in enlightened employment, one of David Bisset's now legendary 'Town Walks' and the usual glittering array of speakers, local and not-so-local.

If you would like to know more, contact David Kelso at 5 Craighenhill Road, Kilncadzow, Carluke, ML8 4QT; e-mail at: davidekelso@yahoo.co.uk. Don't delay too long though, because in the 16th century tolbooths were rather smaller than today's public buildings, so numbers are limited.